# Kubo ratifas sindevigon pri rajtoj por ?iuj personoj




Havano, maj 17 (RHK) La prezidento Miguel Díaz-Canel, ratifis la sindevigon de sia lando kun la rajtoj por ?iuj personoj en la  Tago Internacia kontra? Homofobio, Transfobio kaj Bifobio.

Per mesa?o en Tvitero, la kuba ?tatestro salutis la tagon kaj skribis: “Kubo estas kompromitita kun la garantio de #?iujRajtojpor?iujPersonoj”.

?iun 17-an de majo la mondo memorigas la eliminon de  samseksemo el la listo de mensaj malsanoj flanke de la Monda Organizo pri Sano, kio okazis tiun tagon de 1990.

Tiu ?i okaza?o decidigis la celebron de tiu dato ?iujare, centrita en agoj ta?gaj por denunci la diskriminacion al personoj LGBTI+

Ekde la 4-a de majo kaj ?is la 30-a, Kubo efektivigas la 14-an eldonon de la Agotagoj kontra? Homofobio kaj Transfobio, sub la slogano “?iuj rajtoj por ?iuj personoj”.

Pro la epidemiologia situacio de la Kovim-19, la iniciato organizita de la Nacia Centro por seksa eduko (Cenesex), inkluzivas programon por akademia dialogo, socia aktivismo kaj  artaj iniciatoj tra la virtualaj

spacoj.

?io ?i celas kontribui al la integrala klerigo de la sekseco kaj rekono de la rajtoj por ?iuj personoj sendistinge, kiel ekzerco de egaleco kaj socia justico.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/257535-kubo-ratifas-sindevigon-pri-rajtoj-por-ciuj-personoj

**Radio Habana Cuba**